

El la enhavo – z obsahu:

Z. Bergrová: La fratoj de Krakonošo	3
H. Filová: Irmo	9
E. Urbanová: Iam merkrede, iam marde...	13
J. Karen: Serĉado de la Blua Tono	15

-----  
**La Esperantista Klubo en Praha** okazigos sian regulan **JARKUNVENON** ĵaŭde la 25-an de marto 2004 je la 16-a horo.

Ĉiuj membroj de la klubo kaj ankaŭ gastoj estas bonvenaj.

**La regulaj kunvenoj** de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiŝaŭde en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách 25, kun jena programo:

13 – 14 h Libera tribuno, novaĵoj pri la movado, ĝeneralaj informoj, kuriozaĵoj, ambaŭlingve

14 – 16 h Prelegoj diverstemaj, konversaciado, nur en Esperanto post la 16-a h ekzercado de gramatiko por interesatoj.

Ĉiun lastan sabaton de monato antaŭtagmeze en la kunvenejo okazas seminario de handikapitaj esperantistoj.

Atenton! En julio kaj aŭgusto la kunvenoj de la klubo ne okazas. La unua postsomera kunveno okazos denove ĵaŭde la 9-an de septembro 2004.

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý čtvrtek odpoledne v Praze 1, Ve Smečkách č. 25.

Dne 25. 3. se bude konat výroční členská schůze.

V červenci a srpnu se schůze klubu nekonají.

Letošní 89. světový kongres esperantistů se bude konat ve dnech 24. – 31. července v Pekingu. Záštitu nad kongresem převzal předseda čínského parlamentu Wu Pang-kuo. Téma kongresu je: Jazyková rovnost v mezinárodních vztazích. Čína se na kongres velmi dobře připravuje. 12. ledna se konala tisková konference za účasti 80 předních čínských zpravodajů. Byla už vydána řada publikací v esperantu o dějinách i současném životě Číny a překlady z klasické i současné čínské literatury a zároveň i čínské publikace o esperantu (například životopis L. L. Zamenhova se 150 fotografiemi). Tisíce mladých Číňanů se učí esperantu, esperanto se studuje na 18 univerzitách v zemi.

Čínský rozhlas vysílá denně hodinový pořad v esperantu, který je možno v Evropě zachytit v zimním období od 20.30 do 21.30 h na krátkých vlnách na frekvencích 9720 a 7265 kHz, v letním období (po 28. březnu) od 21.30 do 22.30 h na frekvencích 9880 a 11810 kHz (změna frekvencí vyhrazena), a též na internetu <http://esperanto.cri.com.cn>.

Mimo to esperantský pořad přenáší rovněž Radio Tirana od 18 h na střední vlně 1215 kHz (247m).

### La 9-a konferenco de ĈEA

En la tagoj 17a – 19-a de oktobro 2003 okazis en la bela urbo Litomyšl la 9-a konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Tuta aranĝo estis en hotelo Dalibor, kiu dum la konferenco apartenis nur al esperantistoj. Tie okazis ne nur programoj de la konferenco, sed ankaŭ tranoktado kaj manĝoservoj.

Kiel kutime vendrede vespere estis prelegoj kaj rakontado kun projekcioj el la UK en Gotenburgo kaj pluaj esperantistaj aranĝoj kaj renkontiĝoj.

Sabate antaŭtagmeze okazis kunveno, dum kiu raportis la prezidanto V. Podhradská pri la agado de la komitato dum la pasinta jaro, plue estis raportoj pri la mastrumado kaj raporto de la kontrolgrupo, informoj pri la rilatoj kun UEA, novaĵoj el la Libroservo kaj nova kotizregularo.

Infana rondeto el Česká Třebová (gvidata de Z. Novotná) prezentis mallongan kulturalan programon.

Posttagmeze, kiu deziris, povis per buso viziti Rozan Herbejeton kaj poste trarigardi la urbon. La trafigardo finiĝis ĉe tombo de Karolo Pič, kie oni metis florojn.

Vespere okazis gaja vespero kun danco kaj tombolo.

Dimanĉe antaŭtagmezedaŭris labortraktado dela konferenco (pri Lančov, pri Esperanto-muzeo en Ĉ. Třebová k.t.p.).

La konferenco finiĝis antaŭ la tagmezo.

(Jindřich Ondráček)

Nia eniro en la Eŭropan Union estas granda okazo por Esperanto. Kaj ankaŭ por esperantistoj. Ni bone sicas, ke EU estas socio de multaj popoloj kun diversaj lingvoj. Kiam ni ĉiuj – en kadro de EU – povos libere vojaĝi, tio alportos ankaŭ grandajn lingvajn problemojn.

Iu specialisto-lingvisto antaŭ nelonge diris en nia televido, ke post kelkaj jardekoj la ĉeĥa lingvo verŝajne ĉesos ekzisti. Mi komprenas al lia antaŭtimo. Ni, malgrandaj popoloj, devos akcepti la anglan, francan aŭ germanan lingvojn. Tio signifas lingvojn de grandaj popoloj.

Sed eĉ tio ne povos solvi ĉiujn lingvajn problemojn. Ĉu ĉiu homo, precipe al malgrandaj landoj, devos koni almenaŭ tri ĉefajn lingvojn? Kaj eĉ post tio ne estas certe, ke ĉiuj interkompreniĝos. Por forigo de ĉi tiuj gravaj lingvaj barieroj estas nu runu ebleco: unu internacia lingvo, kiu preferos neniu. Lingvo facila, preciza, uzebla en ĉiu situacio.

Kaj tio estas nur Esperanto.

Laŭ mia ripenso estas necese komenci tuj instrui en lernejoj ĉi tiun lingvon, en komenco kie nedevigan lingvon. Precipe por junaj homoj tio estas tre grava, pro eblecoj de pli facilaj kontaktoj kun alilandanoj.

Mi opinias, ke Esperanto povus stari, kiel internacia helpa lingvo, apud aliaj eŭropaj lingvoj.

Esperanto donas al ni en ĉi tiu tempo grandajn eblecojn, kiel mi jam rimarkigis.

Sed ni solaj povos fari nur malmulte. Ni bezonas internaciajn kontaktoj. Estos necese kunlabori kun esperantistoj de ĉiuj landoj de EU, en la kadro de Eŭropa Esperanto-Unio.

Mi opinias, ke Esperanto jam ne povas resti nur kiel nia persona hobbio, sed kiel komuna aktivado de ĉiuj eŭropaj esperantistoj.

(Helena Filová)

Zd. Bergerová

## La Fratoj de Krakonoŝo

En la Subkarkonoŝa regiono tuj malantaŭ arbaro staris dometo. Vivis tie tri infanoj, neniu plenaĝulo. Tio okazis tiel. Ilia panjo mortis jam antaŭlonge kaj paĉjon mortigis arbo, ĝi falis sur lin dum dehakado en la arbaro. Pri la infanoj estis zorgontaj onklo kaj onklino, sed kiel jam okazadas, la propra etudo estis pli proksima al ili, kaj tial ili permesis, ke la infanoj restu en la dometo kaj la plej aĝa, Cilka, kuiru al ili. Ŝiaj fratoj nomiĝis Tomaso kaj Věroš. La infanoj havis peceton da kampo, herbejon kiel manplaton, sur ĝi pomarbon, ili havis ankaŭ bovineton, kokinojn kaj hundon. Printempe la onklo venis plugi la kampeton, sed ĉion ceteran ili jam devis prizorgi mem. Tomaso dum rikolto falĉis grenon, tiun ili interŝanĝis por faruno kaj grieto, ili rikoltis iom da pizoj kaj terpomoj kaj tiel ili mem vivtenis sin. Lakton kaj ovojn ili havis, sed mankis al ili salo kaj ankaŭ sukero. Věroš estis ankoraŭ malgranda kaj griaĵon li ŝatis dolĉan. Sed por kio ili aĉetos tion, kio mankas al ili.

„Restis al ni post paĉjo sufiĉe da Krakonoŝoj,“ diras Tomaso, kiam oni komencis paroli pri tio. Ili ne emis iri al la geonkloj, ke ili bezonas salon kaj sukeron. La onklo estis frato de ilia panjo, li ĉiam ŝatis vidi ilin, sed la onklino ne, kaj tial ili iradis al ŝi kun peto nur tre nevolonte.

Krakonoŝojn paĉjo elfaris ĉiam vintre, kiam estis malpli da laboro. Li elektis el konvoj por Helado la plej grandajn kaj plej solidajn, kapon li eltranĉis el lignoŝtipeto, ĉapelon kaj kitelon li tranĉis el arboŝelo, ĉiu konusa Krakonoŝo ricevis bastion en la manon.

„Nu, kelkaj ili restis, sed – kiu portos ilin en foirejon. Paĉjo portis ilin tien mem, ĉiam antaŭ festoj...“ daŭrigis Cilka.

„Mi irus,“ aŭdigis sin Věroš.

„Vi estas la ĝusta,“ ridis Cilka. „Al la urbo estas longa vojo kaj nune oni iras sur neĝo. Do ne estas kiel somere, kiam ni iras interŝanĝi grenon.“

„Iros mi,“ sciigis Tomaso. „Pro tio mi komencis paroli pri tio.“

„Se iu iros, do ni ĉiuj,“ decidis Cilka.

Kaj tial la infanoj varme sin vestis, kiel ili nur povis, fermis la dometon je kroĉanso, ŝlosilon ili ne havis, kaj ankaŭ – kiu kion prenis en tia malriĉa mastrumaĵo. Kaj ili ekpaŝis. Krakonoŝojn portis Tomaso en korbo kovritajn per tuko.

Komence ili iris bone. Estis matene, neĝo iom knaris kaj brilis, poste ankaŭ la suno lumis kaj la infanojn preskaŭ ravegis, ĉio en la sunlumo trembrilis kaj pikis la okulojn. Tiam ili iris sur deklivoj. Prefere ili iom deflankiĝis en arbaron, tie estis ombro kaj ŝajnis, ke estas pli varme. Ili iris kaj iris, sed ho ve, iliaj ŝuoj tramalsekiĝis, ili ne estis tro solidaj.

„Věroš, piedfrapu,“ ordonis Cilka. „Vidu, kiel ni piedfrapas, por ke niaj piedoj ne frostvundiĝu.“

Věroš do piedfrapis egale kiel Cilka kaj Tomaso. Sed al ili ĉiuj estis malvarme ĉiam pli kaj pli.

„Ĉi tie estas iaj piedsignoj,“ diras Věroš.

„Tondre,“ ekkriis Tomaso. „Ili estas la niaj propraj. Rigardu. Ili estas triopaj – kaj provu enpaŝi en ilin. Ili identas. Ili estas la niaj. Sur tiu ĉi loko ni jam estis ni rondiras. Ni vojeraris.“

Věroš estis ploronta, sed li kumpremis la dentojn kaj nur singultis.

„Ne timu,“ kvietigis lin Cilka, sed ŝia voĉo iom tremis. „Ni trovos la vojon.“

„Kuŝas ĉi tie dehakitaj arbotrunkoj, ni forigos de sur ili neĝon kaj sidigos nin,“ proponis Tomaso.

Kaj la infanoj tion ankaŭ faris. Ili kunportis pantranĉaĵojn, tial Cilka elpakis ilin kaj la infanoj formanĝis ilin. Sed la infanoj iel ne emis leviĝi kaj iri plu, ili ĉirkaŭbrakis sin reciproke kaj sidis.

La korbo kun Krakonoŝoj staris apude sur la neĝo. Věroš iom moviĝis, por ke estu pli varme al li, li volis rekte Edovi sin en la surtuton de Cilka, iom li puŝis la korbon kaj ĝi renversiĝis.

Subite io moviĝis en ĝi.

Ascendis el ĝi Krakonoŝoj, dume ili kreskis ĝis ili estis altaj kiel homoj kaj estis vivaj.

La infanoj ektimis, al ĉiu misŝanco ankoraŭ tio ĉi.

„Ne timu,“ diris unu el Krakonoŝoj. „Ni ne malutilos al vi. Ni estas fratoj de Krakonoŝo kaj helpas al bonaj homoj.“

La infanoj kvazaŭ mutiĝis.

„Rigardu, kiel ni konstruas dometon,“ diris alia.

Kaj jam ili eklaboris. El neĝo, kiun la infanoj formetis de sur la arbotrunkoj, Krakonoŝoj faris neĝbrikojn kaj konstruis bele de la tero. Ili foruzis por tiu verko ĉiun neĝon el la ĉirkaŭaĵo, kaj la dometo estis baldaŭ preta eĉ kun la tegmento. Tute sama kiel tiu, el kiu la infanoj matene eliris. Sed nun jam estis vespero.

„Nu, bonvolu internen,“ diris unu el Krakonoŝoj kaj malfermis pordon.

La infanoj starigis sin kaj eniris en la dometon. Estis tie varme kaj agrable, kiel hejme.

„Kaj kion vi?“ Věroš demandis Krakonoŝojn, ĉar kelkaj ankaŭ transiris sojlon.

„Pri ni ne timu,“ respondis unu el la fratoj de Krakonoŝo, „ni devas ekip al la foirejo, por ke nin tie homoj aĉetu kaj ni povu doni al vi ian monon.“

„Ni ne volas monon,“ diris Tomaso. „Kaj tute ne kiel kompenson por vi.“

„Ni bezonas nur salon kaj sukeron. Sed pro vi ni tion ne volas, ni prefere iros peti al la onklino,“ aldonis Cilka.

„Ĉu salon kaj sukeron?“ ridis la frato de Krakonoŝo. „Jen en la korbeto estas du saketoj. En la malgranda estas salo, en la pli granda estas sukero.“ Kaj li metis la korbeton, iun li alportis de ekstere, sur plankon.

„Sed vi jam metis en ilin nur neĝon,“ miris Věroš.

„Vi vidis matene,“ kapjesis Krakonoŝo.

„Ĉefe ne iru al la foirejo,“ daŭrigis Věroš. „Ni ne plu volas vendi vin, vij a estas vivaj.“

„Ni dankas, ni dankas,“ laŭtvoĉis Krakonoŝoj. „Sed ni devas iri al la foiro kaj refariĝi la konusaj Krakonoŝoj, ĉar baldaŭ estos Kristnasko kaj homoj volos aĉeti nin por ke ili estu faliĉaj en la nova jaro.“

„Tio, ke ni viviĝis, estas propre verko de nia plej aĝa frato, la montarestro Krakonoŝo.“

„Vi iru trankvile dormi en viajn litojn, ni prizorgos nin.“

Kaj la fratoj de Krakonoŝo forpaŝis.

Kion la infanoj estis farontaj? Ili eĉ ne povis fari ion alian, ol demeti la malsekajn ŝuojn, senvestigi sin kaj enlitiĝi. Věroš ankoraŭ rapide kisis Cilkan kaj esplorpepis:

„Sed estas bonaj la fratoj de Krakonoŝo.“

Matene la infanoj vekiĝis en la litoj, en kiujn ili vespere kuŝiĝis, sed tio ne estis en la dometo el neĝo, sed hejme ĉe la arbarrando.

Cilka leviĝis kaj iris al la korbo, kiu staris sur la planko. Esti sen ĝi du saketoj. En unu salo, en la alia sukero. Ili tiom miris. Sed kie estas Krakonoŝoj?

Tomaso tuj kuris en kameron, Krakonoŝoj tie kuŝis sur breto, kvazaŭ neniu iam prenis ilin de tie. Li iris pli proksimen kaj fiksigardis ilin. Sed kia amuziĝo. Unu Krakonoŝo palpebrumis.

„Vi estas vivaj,“ ekvokis Tomaso.

„Ni ne estas,“ diras tiu Krakonoŝo. „Ni volas nur ion diri. Post kiam malaperos neĝo kaj estos antaŭ Pasko, tiam iru denove en la urbon al la foirejo.“

„Ni havas nenion por vendi,“ respondis Tomaso.

„Sed vi havas,“ oponis Krakonoŝo. „Nur rigardu tie en la hurdon.“

Tomaso rigardis – kaj la hurdo estis plena de paskaj ovoĵoj, kiajn iam pentos panjo.

„Ni dankas,“ li diris al Krakonoŝo, sed tiu kuŝis, eĉ ne moviĝis, ne palpebrumis.

Tomaso reveni sen la ĉambro kaj diris pri la miraĵo al Cilka kaj Věroš.

„Ni tamen ne vendos ilin,“ respondis Cilka. „La paskaj ovoĵoj estas post panjo samkiel Krakonoŝoj post paĉjo, ni retenos ilin.“

„Mi skulptos novajn Krakonoŝojn kaj vi povas pentri novajn paskajn ovoĵojn,“ kontraŭdiris Tomaso.

„Kaj kion faros mi,“ aŭdigis sin Věroš. „Mi scias kion, mi helpos al vi.“

„Tiu Krakonoŝo ja estas ŝerculo,“ diras Tomaso.

(Krakonoŝo estas legenda estro de la montaro Karkonoŝo.

Li estas identa kun la germana Riebezahl.)

Zdenka Bergerová

## La malnovmoda pentristo Marteno

Estis iam iu pentristo. Li loĝis en subtegmento kiel ĉiuj pentristoj, verdire ne ĉiuj, sed tiuj malnovmodaj.

„En la subtegmento estas multe dal umoj,“ konfidence diris la pentristo Marteno al fraŭlino Emma, al kiu li ŝatus edziĝi, se li havus ian pli lukran profesion. Ĉar la pentristoj plej ofte multe da mono ne havas.

„Mi opinias, ke la lumo estas plejparte en la unua etaĝo,“ oponis la fraŭlino por komprenigi al la pentristo, kie ŝi deziras loĝi.

La pentristo Marteno pro sia malriĉeco estis tre malfeliĉa, ĉar la fraŭlinon Emma li ege amis.

„Se vi almenaŭ kolorigus ĉambrojn,“ menciis Emma. Al ŝi Marteno plaĉis, sed ne liaj pentraĵoj. Liajn bildojn ŝi ne konis, ĉar Marteno ĝis nun havis neniun ekspozicion. Ĉambrokolorigistoj estas finance pli bonstataj ol multaj artistoj. Nia pentristo ja opiniis sin artisto.

Li eĉ ne kunvenadis kun ceteraj pentristoj, kiuj en la grupiĝoj Mánes kaj Beseda kvetlis pri tio, kiaj koloroj estos ĉi-jare laŭmodaj kaj kiaj estos venontjare. Kaj ĉu bildoj estas pentrendaj laŭ realo aŭ laŭ revoj.

Marteno pentos laŭ revita realo.

„Ĉi tie mi pentris balkonon kun floroj. Ĝi apartenas al bela sunplena loĝejo en la unua etaĝo,“ li montris al Emma sian lastan verkon. Sed fraŭlino Emma nur paŭtis. Ŝi volis belegan sunan loĝejon, kaj ne bildon.

Marteno tamen belegan loĝejon nur pentris. Kaj antaŭ ĝi balkonon plenan de floroj. Kiam la bildo estis preta, li sidigis sin antaŭ ĝin kaj revis. Poste li stariĝis, alpaŝis tuŝproksime la bildon – transpaŝis la kadron, - transrampis la balustradon de la balkono, malfermis pordon de la loĝejo kaj eniris.

Li estis en bele meblita ĉambro, lumis ĉi tien la suno, en la centro estis ronda tablo sur ĝi brodita tablotuko, ĉirkaŭe remburitaj seĝoj. Ankoraŭ estis tie ajn mebloj, sed ĉefe sur vando pendis plua bildo. Ankaŭ unu el liaj propraj. Marteno jam preskaŭ forgesis pri ĝi, sed nun li vidis ĝin denove kiel tiam antaŭlonge, kiam ĝi estiĝis.

Kio estis sur la malnova bildo... Malgranda ĉarpentita kabano apud arbaro.

La pentristo deprenis la bildon kaj iom turnis ĝin. Kaj vidu, proksime de la kabaneto aperis vojo kaj sur ĝi iris panjo de Marteno.

„Panjo,“ diras Marteno. „Kion vi opinias, post kiam vi mortis, mi foriris el la hejmo kaj vizitis lernejon por gloraj pentristoj.“

„Tio estas bona,“ respondis panjo. „Sed vi devus pentri ĉiam kiel tiam, kiam oni akceptis vin en la lernejon pro tiu ĉi bildeto.“

„Tio ne estis pro unu bildeto, panjo, mi devis plenumi ekzamenon. Kaj poste la lernejon mi eĉ ne finis, ĉar mi ne havis monon por vivteno. Mi komencis bildojn vendi, por vivteni min.“

„Nu vidu, tio estas ankaŭ bona, mem vivteni sin,“ panjo ne lasis sin erarigi kaj laŭdis lin plu.

„Sed bildoj estas vendataj malmulte kaj mi ne havas monon superfluan.“

„Tio ne gravas,“ daŭrigis panjo. „Nur se tio sufiĉas por modesta vivo.“

„Por mi tio sufiĉus,“ diras la pentristo, „sed mi ŝatus edziĝi,“ kaj vi ne konas mian Emman.

Mi devus montri ŝin al vi. Mi desegnis ŝin, eĉ se tio ne plaĉis al ŝi.“

„Ĉefe, ĉu ŝi aspektas tiel,“ diras panjo.

„Aspektas... Ĉu vi scias kion, panjo, transpaŝu la kadron kaj venu ĉi tien en mian ĉambron.“

„Mi ne povas, mi estas en mia mondo por ĉiam. Sed vi povus ree transpaŝi la kadron kaj reveni al mi. Ankaŭ kun la portreto de Emma.“

La pentristo pendigis la bildeton de la kabano, malfermis grandajn pentristajn kovrilojn, kiuj kuŝis sur parada tablo, foliumis singardeme en desegnaĵoj kaj unu li eltiris. Tiun, sur kiu estis Emma. Li bele rulis ĝin kaj iris ree al la bildo sur la vando.

Li sukcesis depresi la bildon, kvankam li havis liberan nur unu manon. Sed pentristoj estas lertaj.

Kaj tiam li transpaŝis la kadron kaj jam li estis sur la vojo, sur kiu venis lia panjo. Nun ŝi staris tie kaj atendis lin.

„Ni povas iri hejmen, Marteno,“ ŝi bonvenigis la pentriston.

Kaj tiel ili eniris en la kabaneton. La pentristo Marteno rapide ĉirkaŭrigardis, ĉio restis egala kiel tiam, kiam li ĉi tie naskiĝis kaj elkreskis. Paĉjo sidis ĉe tablo, la pli aĝa fratino lavis vazaron.

„Bonan tagon,“ salutis la pentristo.

„Bonan. Nu, jen vi ankaŭ foje vizitas la hejmon,“ bonvenigis lin la patro.

„Ni ne estas laŭ lia gusto,“ aŭdigis sin de la vazaro la fratino Lenka.

Marteno ekkonsciis, ke efektive jam longe li ne estis tie, kie li naskiĝis, kaj kie ja ne plu vivas liaj gepatroj, sed vivas tie la fratino, kiu havas kvar infanojn. Li devus viziti ilin. La edzo de la fratino estas lignaĵisto, kiu povus pretigi por li latojn por kadroj. Certe li farus ilin malpli koste, ol pentristoj pagas en Prago. Kaj li ree povus – ĉu li povus ilin iom subteni? En la submontaro ĉiu krono estas bonvena. Sed kion pri tio eble dirus Emma.

„Estu kontenta, ke li estas ĉi tie almenaŭ hodiaŭ,“ diris panjo al Lenka.

„Mi venos, venos,“ promesis la pentristo.

„Ne, Emma ankoraŭ ne estas mia fianĉino. Nome – mi volus, sed Emma eble trovos por si iun, kiu havas pli multe da mono.“

„Do ŝi ne estas la ĝusta,“ konkludis paĉjo.

„Kiam ŝi pensas pri mono, tiam forkurigu ŝin,“ aldonis la fratino.

„Ni ankoraŭ eĉ ne vidis ŝin,“ parolmaskis tion panjo. „Do, montru.“

La pentristo Marteno metis sian desegnaĵon sur la tablon antaŭ paĉjo. Panjo alsidigis sin sur aia seĝo kaj Lenka ĉesis la Laudon kaj klinis sin super la tablon inter ili.

„Ŝi havas kurban nazon,“ ŝi aŭdiĝis.

„En realo ŝi ne havas, verŝajne mi ne desegnis ŝin bone,“ rapide kontraŭstaris Marteno.

Sed subite li ekkonsciis, ke la nazeto de Emma efektive iom oblikvas.

„Kio koncernas tion, bela ŝi estas,“ laŭdis paĉjo la pentristan desegnaĵon.

„Se ŝi estas tiel bona, kiel ŝi estas bela, tiam – dank’ al Dio – edziĝu al ŝi, sed nur se ŝi estas ankaŭ tiel bona, pri tio temas el ĉio plej multe, Marteno,“ rememorigis panjo.

„Sed tion mi ja ne povas scii,“ hezitis Marteno. „Bona ŝi estas, sed ŝi volus farti bone. Kaj tion mi ne povas promesi al ŝi. Mi ne scias, kiel mi iam prosperos.“

„Klarigu tion al ŝi – kaj vi vidos. Bele sen elturniĝoj – kaj tuj estos klare,“ esprimis sin paĉjo.

„Se vi edziĝus ĉi tie al Katka de la najbaroj,“ aŭdigis sin Lenka, „tiam vi ne havus zorgojn. Ŝi scias, ke iam eĉ post laboro ne estas oro.“

Marteno pri Katka ne memoris tuj. Poste li rememoris, ke ĉe la najbaroj ili havis ian malgrandan eterne nekombitan bubinon. Eble ŝi jam elkreskis kaj serĉas fianĉon.

„Lasu lin trankvila,“ prikiis panjo Lenkan.

„Vi devus rigardi la ĝardeneton kaj la arbaron,“ paĉjo turnis paĝon.

„Mi dume kurios al vi laktosupon kiselo,“ aldonis panjo.

Marteno eliris el la kabaneto. Alkuris al li hundo.

„Ĉi estas ĉi tie ankaŭ, Barono,“ karesis lin Marteno.

El la ĝardeno estis belega elrigardo malsupren en la pejzaĝon. El malproksimo konturiĝis Ruinoj, la tuta baseno de Bohemio estis dronanta en nebulo.

Kial mi ne estis ĉi tie tiom longe, pensis Marteno. Kaj tiam li ekkonsciis tion. Unue panjo, poste ankaŭ paĉjo, ambaŭ mortis. La fratino edziniĝis. Tiutempe, kiam li foriris, li ĝojis, ke li sukcesis eniri lernejon, li fermis post si la pordon de la hejmo.

Li promenis iom, profunde spiris la ĉi tiean freŝan aeron. Ĉi tie ĉe rando de la arbaro estas akvofonto, al ku oni iras por trinkakvo. El puto ĝi ne estas tiom bongusta. Jen estas arboj en la ĝardeneto, li grimpis sur ilin kun la buboj de najbaro. Kaj jen ĉe la ŝedo – ĉu estas eble? Ruinoj de lia eksperimento konstrui aviadilon. Kiel li tiam revis pri la fora mondo... Li reveni sen la ĉambron. - - Ĝi estis malplena. Kaj sur la ĉarpentita vando pendis malgranda fotografaĵo de la gepatroj. Ili ne vias plu, ekpensis Marteno. Subite estis al li maluje, samkiel kiam li fuĝis el la hejmo en lernejon. Li fuĝis, li konsciis, ke li fuĝis. La fratino edziniĝis ankoraŭ pli frue, ol la gepatroj mortis, kaj ŝi foriris en pli grandan domon de sia edzo – pli prokrmen al la urbeto.

Li lasis la desegnaĵon de Emma sur la tablo kaj eliris el la dometo. La vojo kondukis al la pejzaĝo.

Li trairis peceton da vojo kaj jen estis la kadro. Marteno transpaŝis ĝin reen, aperis en la bela ambro, kie li staris antaŭ sia malnova bildo. Sed kial subite ne plaĉis al li en la parada ĉambro? Li ĉirkaŭrigardis kaj sentis, ke la farboj, per kiuj li kolorigis ĝin, estas venenaj. Tia terura verdo. Li malfermis la pordon al balkono, sed tie la verdo estis ankoraŭ pli venena. Hop, jam li transrampis la balustradon kaj transpaŝis pluan kadron.

Nun li estis en sia subtegmento.

Li ja ne nostalgios ĉi tie. Li vestis sin kaj iris inter pentristojn.

Ĝuste ili estis disputantaj.

„Laŭ la realo pentri ne eblas,“ laŭtis iu.

„Nu, estas malnova afero, ke ne, sed temas pri tio, kion propre oni pentru. Mi ekzemple pentos, kio plaĉas al mi. Kaj plaĉas al mi pentri nut iom ion. Por ke mi esprimu ĉion.“

„Tio espereble ne,“ kontraŭstaris Marteno. „Ĉion esprimi ne eblas.“

„Vi silentu, vi venas ĉi tien unufoje dum la sankta tempo. Kaj vi perdis vin en la pasinta jarcento,“ fervoris tiu parolanto.

„Viaj pejzaĝoj...“ aliĝis alia.

„Vi estas simple malnovmoda pentristo,“ atakis Martenon plua.

„Do estu,“ ofendiĝis Marteno. Li surmetis surtuton kaj foriris de tiuj kverelantaj pentristoj.

Stultuloj, li malpezigis sian koron. Se ili scius, kiel eblas transpaŝi kadrojn... Sed en iliaj ŝmiraĵoj ili eble vojerarus.

Li iris laŭhazarde – kaj subite li estis en stacidomo.

Morgaŭ mi veturos por viziti la hejmon, li diris al si kaj aĉetis veturbileton. Eble tie la malnovmoda pentristo estos konvena en la pejzaĝo. Ĉi tie estas multe da venenaj koloroj.

Li eĉ ne povis tuj forvojaĝi, sed li ekkonsciis, ke li aĉetis nu runu bileton. Kio, se Emma volus veturi kun li...

Li revenis en sian subtegmenton.

Li starigis ĉirkaŭ si bildojn. Ili estis dek.

*Fontano ne estas lavabo*, estis la nomo de unu. La pentristo Marteno eĉ ne devis eniri en ĝin, la buboj mem divenis, ke spraji ne estas plej bone.

Eble el ili foje estos pentristoj, li ekpensis.

En tiu momento iu eksonorigis. Marteno iris malfermi – kaj li ekĝojis. Post la pordo staris Emma. Jam kelkfoje Marteno invitis ŝin en sian subtegmenton. Ŝi ĉiam rifuzadis, kaj nun ŝi estas ĉi tie.

„Mi rigardos viajn bildojn,“ ŝi diris.

Kaj tial ili rigardis kune.

„Tio ĉi estas *Nigra reĝidino*,“ fieris Marteno. Ĉar ŝi estas saĝa, neniu ŝtelas ĉe ili, ne mensogas kaj ne militas.“

„Kaj kion faras tiu ĉi bubino,“ demandis Emma kaj montris al Erika sur la bildo *Bobelo*.

„Ŝi elĵetas cigaredojn.“

„Ĉu ŝi certe volas ilin elĵeti?“ demandis Emma.

„Ni povas demandi ŝin,“ respondis Marteno kaj transpaŝis per unu kruro la kadron. „Erika, ĉu vi volas elĵeti la cigaredojn volonte?“

„Mi volas,“ respondis Erika kaj ĵetis la cigaredojn en kloakon plu.

Emma ĉe tio restis tute mirrigida.

„Marteno, Marteno,“ ŝi rekonsciigis, „vi scipovas miraklojn!“

„Tio estas nenio,“ rimarkigis Marteno malzorgeme kaj remetis la krupon reen.

Emma estis kvazaŭ en ekstazo, Marteno estis enpaŝanta en unu bildon post alia, plej longe li restis en la *Virtuala Vyšehrad*, ĉar ĝi estas tia instrua bildo. Al Emma ĉio tre plaĉis, plej multe la ĉimpanzino *Ŝimmi*.

„Ĉu mi enpaŝi bildon ne povus?“ ŝi demandis.

„Sed tute senprobleme, provu tion.“

Kaj efektive Emma sukcesis transpaŝi la kadron kaj jam ŝi estis ĉe *Ŝimmi*.

„Instruu min danci, *Ŝimmi*,“ ŝi alparolis la simieton.

„Komencu, ĝi efektiviĝos mem,“ respondis *Ŝimmi*. Kaj tiel ili kune satdancis.

„Rigardu,“ Marteno vokis Emman reen. „Tio ĉi estas la *Fratoj de Krakonoŝo*. Ili ĉiam helpus nin, se... se ni Lotus en Subkarkonoŝo...“

Emma revenis de *Ŝimmi*, sed ankoraŭ ŝi volis demandi Igoron, ĉu ŝi ankaŭ povus ricevi flugilojn.

„Tio dependas de paseroj,“ respondis Igoro. „Al mi ili pruntedonas ilin. Sed se vi ŝutus a lili panerojn vintre, tial ili pruntedonos ilin ankaŭ al vi...“

„Mi ne scias, mi ne scias, ni ne rajtas postuli multon,“ esprimis sin Marteno. „Ni ja povas vojaĝi eĉ sen flugiloj, ni havas sanajn krurojn.“

„Tio estas vero,“ revenis Emma.

„Pri nia feliĉo devas zorgi ĉefe ni mem,“ daŭrigis Marteno. „Sciu, mi ŝatus inviti vin al ni en la submontaron. Ĉu vi veturus tien kun mi?“

„Kial mi ne veturus. Ĉu vit ion opinias kiel por ĉiam?“

„Por ĉiam,“ diris decigiĝeme Marteno.

„Nu do por ĉiam. Kial ne,“ konsentis tuj Emma. „Ni jat amen povas fari ekskursojn tra viaj bildoj en la tutan mondon.“



Helena Filová

## **I R M O**

(Nur rakonto)

Tiu longa cikatro havis sian historion.

Kiam Filipino rigardis ĝin, li ĉiam diris: „Miĥailo... Se li vivas, li certe estas bonega kuracisto.“

Mi ankaŭ konis la okazintaĵon de tiu cikatro.

Filipo batalis dum la dua mondmilito en orienta fronto. En tiu tempo li estis nur dudekjara junviro.

Post kelkaj semajnoj de bataloj li povis vidi ĉiujn terurojn de milito. Multaj liaj kamaradoj, junaj, sanaj, vivplenaj, jam pereis. Filipino vidis ilin mortadi, li vids ilin enterigi en komunaj tomboj.

Fine feliĉo forlasis ankaŭ Filipon. Li estis tre danĝere vundita, lia kruro estis disŝirita de genuo ĝis Maleno. Kun sango el profunda malfermita vundo forkuris ankaŭ lia vivo. Li ankoraŭ sentis, ke unu pli maljuna soldato per ponuko tre forte bandaĝis al li la krupon sub la genuo. Post tio Filipino jam sciis nenion. La perdo de sango estis tro granda.

Filipo vekigis en soldata lazareto.

Li ekvidis super si lacan vizaĝon de juna viro en blanka kuracista mantelo. Liaj haroj estis tute tonditaj, preskaŭ ĝishaŭte, kiel havis ceteraj soldatoj.

„Nu fine!“ li diris, „vi havis ceteraj soldatoj.“

„Ĉu vi estas doktoro? Tiel juna?“ demandis Filipino mirege.

„Ne. Nur medicinstudento. Ĝis la fino de mia studado mankas nur kelkaj monatoj. Sed nun ne estas tempo por fari diplomon laboron por doktoreco, kiam mi jam estas kapabla sufiĉe bone labori en operaciejo. Kion fari, kiam nun mankas tiel multe da kuracistoj?“ Kaj li aldonas kun ekrideto: „Jen via kruro estas mia doktoreco. Sed vi povas titoli min nur Miĥailo“, li ekŝercis.

Tiel ambaŭ junaj viroj amikiĝis. Nokte, kiam Filipino ne povis dormi, Miĥailo ofte eksidis sur la krejon al Filipino kaj ili mallaŭte interparolis.

Malgraŭ tio, ke Miĥailo parolis nur ruse kaj Filipino ĉeĥe, unu al alia komprenis preskaŭ ĉiun vorton.

Sed post nelonge Filipino devis foriri en alian hospitalon kaj post iu tempo denove al la fronto. Li nur interŝanĝis kun Miĥailo adreson, ĉar post la milito certe ili skribos unu al alia.

Kiam Filipino en unuaj pacaj tagoj revenis hejmen, ĉio estis tute alia, oli li tion imagis en tiuj kruelaj militaj tagoj. Lia patrino mortis jam antaŭ kelkaj monatoj, fratino eksedziniĝis kaj restis sola kun du malgrandaj infanoj, nervoza kaj ekscitita – tio nun estis atmosfero en lia gepatra domo. Patro mortis jam antaŭ la milito – feliĉe – ekpensis Filipino maldolĉe. Kaj Mario, lia amata Mario, ne atendis Filipon, sed infanon kun sia novedzo.

Antaŭ Filipino nun estis nur unu klara vojo. Li studos, kiel li revis pri tio post maturec-ekzameno.

Sian naskourbeton Filipino forlasis sen bedaŭro. La praga universitato signifas por li novan vivepokon.

En tiu tempo li multfoje pensis pri Miĥailo, pri iliaj netaj interparoloj, ĉu Miĥailo feliĉe revenis...

Filipo ankaŭ komencis lerni ruse, post nelonge li povis skribi al Miĥailo leteron.

Miĥailo estis en Kaŭkazo. Li nun povas havi ankaŭ alian adreson, sed liaj gepatroj certe al li la leteron sendos.

Sed Filipino ricevis neniun respondon. Miĥailo plej eble antaŭ longe forgesis.

Kiam mi ekkonis Filipon, li estis preskaŭ tridekjara kaj laboris kiel advokato. Mi nur finis gimnazion. Post nelonge (necesas aldoni – al mia mirego) Filipino al mi edziĝis.

Filipo estis bona edzo: ĉiam ĝentila, afabla kaj zorgema. Nur la vivo kun li pasis tre rapide, kaj tiel jaro post jaro trafalis en eternecon.

Ni jam festis dudekkvinjaran jubileon de nia geedziĝo. Inter kelkaj bondeziroj estis ankaŭ letero de Agneso, fratino de Filipino. Ŝi daŭre loĝis en tiu malnova gepatra dometo, ke ŝi kaj Filipino naskiĝis kaj kune travivis infanecon kaj junecon.

Kiam Filipino malfermis la leteron de Agneso, li eltrovis ankoraŭ unu koverton: - „Tio alvenis je via nomo, Filipino. Iu havis, videble, nur vian malnovan adreson“ skribis Agneso, „do mi sendas tion je via nuna praga adreso.“

Filipo rigardis, tute konsternita, koverton kun nekonata manskribo, kun rusaj poŝtmarkoj.

Letero de Miĥailo! Post tridek kvin jaroj!

Miĥailo volis viziti nian landon, ekvit denove Filipon, sed fina celo de lia vojaĝo estis Germanio.

Kompreneble, Filipino tuj respondis. Li konis ruse sufiĉe bone, en nia lando estis post la milito en ĉiuj lernejoj la rusa lingvo deviga.

Filipo skribis al Miĥailo, ke nun li vivas en Praha kaj invitas Miĥailon al ni.

Tiun posttagmezon, kiam Filipino forveturis en aerodromon por Miĥailo, mi estis tre maltrankvila. Mi volis prepari la plej bonan gastigon por la malnova amiko de Filipino, por la amiko, kiu jas avis la vivon de mia edzo.

Fine Miĥailo staris en la pordo.

Bona Dio! Tiel belegan viron mi vidis ankoraŭ neniam. Eleganta, svelta, alta kaŭkazano, malhelaj okuloj, malhelaj haroj nur sur tempioj modere tragrizitaj, sendifektaj dentoj en modera ekrideto – tio estis Miĥailo, kiu devis jam antaŭ longe trapasi kvindekajn jaron.

Plena de embarasoj mi eĉ hontas paroli kun li per mia malbona rusa lingvo. Sed, feliĉe, almenaŭ mangaĵojn mi kapablas prepari bone.

Nur post la vespermanĝo Miĥailo rakontis al ni sian okazintaĵon.

Miĥailon atingis la fino de milito en Germanio. Kiel leŭtenanto de venkinta armeo li restis ankoraŭ post la milito kelkajn monatojn en ĉi tiu lando.

Li estis kvartirita en ia militdifektita, duone ruinigita dometo, nemalproksime de Dresdeno. Tie ankaŭ loĝis maljuna germana profesoro kun sia filino. Lia edzino kaj kvardekjara filo pereis dum vizito de avino en Dresdeno, en tiu tragika punkto de terura usona bombatako.

Sinjoro profesoro rigardis Miĥailon per okuloj, plenaj de malamikeco. Antaŭ du jaroj li revenis el rusa fronto kiel kriplulo. Oni devis amputi al li piedon kaj li povis iradi nur per helpo de lambastonoj.

Miĥailo sciis, ke la profesoro estas obstina nazio, kiu neniam ĉesis adori sian hetmanon Hitleron.

Estis nekredeble, ke tiu fihomo havis tiel belegan kaj inteligentan filinon: belulinon kun bluaj okuloj, nigraj haroj kaj ĉarma junulina staturo. Ŝi nomiĝis Irmo kaj post la morto de patrino ŝi zorgis pri sia patro kaj ilia malriĉa mastrumaĵo. Sed precipe ŝi devis ĉiun tagon stari senfinajn atendovicojn por aĉeti iom da nutraĵoj. Kaj ankaŭ Miĥailo havis siajn ĉiutagajn devojn.

Sed ne daŭris longe kaj ambaŭ junaj homoj amikiĝis, malgraŭ tio, ke Miĥailo ne konis germane kaj Irmo ruse. Sed Irmo havis rusa-germanan vortareton, kiun ŝia patro uzadis, kiam li ankoraŭ „agadis“ en Ruslando.

Ĉiam vespere, kiam tiu maljuna krimulo ekdormis, Irmo kun Miĥailo sidadis en la malgranda ĉambreto de Irmo, ĉe lampo kun grandvalora petrolo kaj vigle foliumis en tiu vortaro.

Miĥailo konis nur tri germanajn vortojn: „Ich liebe dich.“ Kaj Irmo ĉiam respondis: „Ljublju tebja!“

Germana knabino kaj juna rusa soldato travivis amon, kiu ne havis morgaŭon, ne havis estontecon.

Alvenis tago, kiam Miĥailo devis reveni hejmen.

En tiu lasta kuna vespero Miĥailo, per helpo de la fuŝpalpita vortaro, diris al ploranta Irmo: „Mi ĵuras, ke mi nepre revenos.“ Kaj Irmo respondis: „Mi atendos vin. Tiel ĵuras mi.“ Kaj post tio la tutan reston de la vespero ili jam silentis.

Miĥailo preskaŭ ne povis paroli, kiam li tion al ni rakontis. Nur post kelkaj minutoj li povis kontinui:

„Kiam mi revenis hejmen, mi eksciis, ke dum la miito pereis ĉiuj membroj de nia familio: patro – lokomotivestro – trovis sian morton ie ĉe Kievo, panjo, kiu laboris en infanvartejo, pereis dum evakuado, fratino restis sub ruinoj post bombatako. Tiel mi restis tute sola.

Por mi estis nun la plej necesa, fini miajn studojn.

Tuj post tio mi komencis labori kiel ĥirurgo en tiu granda hospitalo, kie mi laboras ĝis hodiaŭ, nun kiel ĉefĥirurgo.

Precipe en komenco mi ofte pensis pri Irmo, ĉar la situacio en nia lando estis pli ol malfacila. Nur diri al iu, ke mi amis germanan knabinon, kaj krom tio filinon de maljuna esesano – tio estus en tiu tempo mia fino.

Mi vidis nenian eblecon skribi al Irmo almenaŭ leteron, estis nenia ebleco vojaĝi eksterlanden.

Tiel mi travivis kelkajn jarojn de terurega postmilita kolektiva – por vi tute neimagebla – vivo ĉe absolutna foresto de privateco.

El Irmo restis nur vana revo.

Post jaroj mi fine edziĝis. Sed mia edzeco ne estis feliĉa. Ĝi baldaŭ finiĝis per eksedziĝo, mia edzino malamamis miajn oftajn noktajn servojn. Jes, mi ankaŭ havis filon. Li ne volis lerni, li amis nur aventurojn. Antaŭ kelkaj jaroj li restis ie sub Pamiro, kiel montargrimpanto. Tie mi denove restis tute sola.

Sed antaŭ nelonge mi „ricevis sur tablon taŭgan homon“. Li promesis al mi ĉion, se li transvivis. Kiam li resaniĝis, li demandis min, kion mi dezirus. Kaj mi – en ŝerco – diris al li, ke mi volus denove vidi lokojn, kie mi travivis finon de milito, en ĉirkaŭo de Dresdeno. Kaj ankaŭ viziti mian maljunan ĉeĥan kunbatalanton.

„Detalo,“ li diris al mi.

Mi preskaŭ forgesis lin, sed li – al mia granda miro – ĉion por mi aranĝis.

Tiel mi nun fine povos plenumi mian promeson, ke mi revenos.“

„Miĥailo, mi petas vin,“ diris Filipino, „ne faru tion. Irmo certe ankaŭ edziniĝis, havas familion. Krom tio, ŝi jam ne estas la juna, deknaŭjara knabino el viaj revoj, kiun vi tiame devis forlasi.“

Sed Miĥailo diris kun certeco „Ne, Filipino. Mi scia, ke Irmo restis needziĝinta. Kaj ne nur pro tio, ke post la milito en Germanio estis nenioj junaj viroj por edziĝo. Irmo estis alia. Ŝi certe nun laboras ie en oficejo. Kaj mi ankaŭ scia, kiel ŝi nun aspektas. Mi tamen ne estas ia naivulo. Kiel kuraciso mi konas imagi pli ol kvindekjaran virinon. Sed ŝi certe restis svelta, nur en ŝiaj nigraj haroj estas iom da arĝento kaj ĉirkaŭ okuloj etaj ventumiletoj de sulkoj: Sed mi neniam ĉesis kaj ĉesos ami ŝin. Fine nun mi povas oferti al ŝi komunan estontecon. Mi havas bonegan postenon.“

„Miĥaio, ne faru tion,“ diris Filipino denove.

„Mi petas, akompanu min, Filipino. Vi ja povas vojaĝi Dresdenon sen problemoj. Krom tio, vi konas germane, mi nur iom anglan lingvon. Mia generacio ne sopiris lerni lingvon de niaj malamikoj. Mi estos tre dankema al vi, kiam vi estos al mi tradukisto.“

„Kaj kiam vi volas vojaĝi?“ demandis Filipino kun ekĝemo.

„Tuj morgaŭ,“ diris Miĥailo decide.

„Do, en tiu kazo ni povas veturi per nia aŭtomobilo,“ rezignis Filipino.

„Ĉu mi povas veturi kun vi?“ mi demandis senkuraĝe. „Eble, ke mi povos esti al vi utila.“

„Certe,“ diris Miĥailo distre, pensante jam pri io alia.

Estis unu el belaj, sunplenaj aŭtunaj tagoj. Ni elveturis tuj post mateno.

Miĥailo estis tute trankvila.

Ni bone konis la vojon al Dresdenu, en pasinteco ni tiun urbon kelkfoje vizitis.

„Mi estis ĉi tie, kiam Dresdenu estis tute en ruinoj,“ rimarkis Miĥailo. „Nun ni devas devojiĝi maldekstre!“

Post kelkaj kilometroj Miĥailo diris: „Ĉi tie! Haltigu, Filipino! Tio estas la preĝejo – kaj tie estas tiu dometo,“ montris Miĥailo. Nun ĝi estas kompreneble riparita.

Filipo haltigis proksime de la domo, kiun Miĥailo indikis kun tia certeco.

Ni eliĝis kune. Kun batanta koro mi sekvis ambaŭ virojn.

Antaŭ la domo, sur korteto, ion faris ia ne tro pura maljunulo. Filipino laŭte salutis. Kaj post tio denove. La maljunulo ne aŭdis.

Fine li hazarde levis la kapon kaj nur post tio li alvenis al drata barilo. Li almetis al si manojn sur orelojn.

„Mi ne aŭdis,“ li kriis germane, sed momenton, mi tuj sendos al vi la edzinon!“

La maljunulo malaperis en la domo. Post nelonge eliris ia maljunulino, kiel sorĉulino el mocipana dometo. Dika, nepura, pli malpli sepdekjarulino kun malkombitaj grizaj haroj kaj kun teruregaj, grandegaj mamoj, kiuj penis al ŝi ĝis talio. Malpuran antaŭtukon ŝi havis ĉirkaŭmetitan per dika rimeno, kiu verŝajne funkciis kiel mamtolaĵo. Ŝvelintaj kruroj enestis en malnovaj lanŝuoj.

„He?“ demandis ŝi kaj scivole rigardis nin kaj nian aŭtomobilon

Filipo komencis precize traduki, kion diris Miĥailo.

„Sinjorino, ni havas peton: Post la milito loĝis en ĉi tiu domo sinjoro Hollmann, aŭ ĥochamnn kun sia filino Irmo. Ĉu vi povas konsili al ni, kie ŝi nun estas?“

La virinaĉo momenton pripensis.

